Universala Esperanto-Asocio

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landa parad’

## Kalejdoskopo de la regiona, landa kaj loka agado de nia mondvasta komunumo

Projekto lanĉita en 2018 sub la nomo GAMO.

# PACIFIKO









Stefan MacGill, Budapeŝto, aprilo 2022

Historio: 2021 februaro.

© Universala Esperanto-Asocio
© Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landa Parad': La nova regiono

La nova regiono okazis por enpreni landojn, kiuj ne ĝis nun trovis lokon en <Landa Parad'>. Ĝi kunigas landojn pro la similetaj kulturaj fonoj kaj plejparte alta viv-nivelo. Tamen jam okazas interregiona kunlaboro kaj ni aktive kuraĝigas tion. Aŭstralio kaj Nov-Zelando kunlaboras kun Azio, Usono kaj Kanado aktive kunlaboras kun Latin-Ameriko. Marto 2021: Ni nun tamen aldonas Meksikon, kiu ja apartenas geografie al la Norda Ameriko, ĝi kulture apartenas pri la Latinameriko. Ni aperigas ĝin en ambaŭ regionoj; ĝi povas kontribui al ambaŭ. Ni agnoskas ke la kategorio 'Pacifiko' estas iom artefarita – Usono kaj Kanado estas samtempe Atlantikaj nacioj, Meksiko same Karibea, sed la komuna nomo de la regiono tamen utilas kaj defendeblas.

# Novigoj en 2022

- Aktualigo de la membronombro ĝis la finsumo por 2021.
- Aktualigo de la datumoj pri aĉetpovo (MEP/PPP) laŭ IMF ĝis aprilo 2021.
- La datumoj pri popoloj restas obstine malaktualaj el 2019.
- Nova postkomenca paĝo.

# Streboj

- Penetru unu aŭ du pacifikajn insulojn.
- Konigu pli forte la kulturojn de la pacifikaj komunumo – rompu la Eŭropan hegmonion! Tiucele laboros AMO 86 (Aŭstralio) kaj AMO 90 (UK).








Fotoj: La kurso en Aŭklando,
Nov-Zelando en januaro 2020; la tasko estis decidi pri la dek plej gravaj inventaĵoj de la monda historio; AMO 4 en Sidneo, Kanado en julio 2014 plus la kongresa emblemo. Usono, kunsido en Nordvirginio en 2022.

# Aŭstralio 

**Landkodo:** AU**. Mono:** AUD (dolaro)**. Telefonkodo:** 61**. Ĉefurbo:** Kanbero (Canberra)

**Areo:** 7,6 m. km². **Loĝantaro**: 26 milionoj (55a en la mondo); 5,3 milionoj en Sidneo
**Denseco**: 3,3 homoj / km². **Jara kresko**: 1.8%. **Mezaĝo:** 38-jara. **Urbiĝo:** 8 6%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 54.891 do en la 29a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas ampleksas, senkritika, laste redaktita en 2020.

**Landa Asocio:** AEA, 1911 (aliĝo al UEA 1942). Membroj de UEA fine de 2021: AM 72 + IM 30, sume: 102: Prezidanto: Sandor Horvath.
**LA-adreso:** GPO Box 2122, 3001 Melbourne Vic, Aŭstralio
**Telefono:** (03) 9525 4295
**LA retadreso:** sekretario@esperanto.org.au
**LA retpaĝo:** http://aea.esperanto.org.au
**Organo:** Esperanto sub la Suda Kruco (komuna organo kune kun Nov-Zelando). 4 numeroj jare. Arĥivo alirebla tra la hejmpaĝo de AEA. Redakcio: esk@esperanto.org.au

**Membraro (IM) en UEA.** 2021: 309. 2009: 40. FC 2021: 1. 2009: 0
**Ĉefdelegito:**. Katja Steele, 143 Caulfield Av, Clarence Gardens SA, 5039; katja.steele@gmail.com
**Kotizperanto:**. AEA.
**Komitatano A de UEA:** S-ro Paul Joseph Desailly.
**Sidejo kaj libroservo:** Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern NSW 2016 (Interna antaŭurbo de Sidneo – lok-trajne unu stacio for de la centra stacidomo.). Vidu la bildon.



**Delegitoj en JL 2018:** 7 personoj (4 D, 3 FD) en 6 urboj.
**Fakaj Asocioj Aliĝintaj al UEA:**
***Instruistoj:*** ILEI: reprezentanto Penny Vos: <penivos<ĉe>yahoo.com> kun anglalingva retejo: https://sbvano.wixsite.com/oceanio kiu donas konsilojn kiel akiri komputikan tradukon en Esperanton. Jen la sekcia emblemo.

ILEI oceanio

***Komerco:*** IKEF havas komitatanon el Aŭstralio.

**Lokaj grupoj:** Sidneo, Melburno, Adelajdo, Nov-kastelo, Kanbero, Perto, Hobarto (en Tasmanio), Brisbano, Torquay, Tuvumbo (Toowoomba)
**Internaciaj aranĝoj:** La 82a Universala Kongreso en Adelaide en 1997. La 31a Konferenco de ILEI en Lara en 1997. Plus pluraj pacifikaj kaj komunaj kongresoj kun Nov-Zelando, plus kongresoj trilandaj kune kun Indonezio. AMO planata por junio 2022.

2022: iris apr. 9
Sendita jan 9, 2021. Respondis HH feb 12 pri telefonoj, retejo kaj lokaj grupoj. KS feb 13.

# Nov-Zelando 

**Landkodo:** NZ**. Mono:** NZD (dolaro)**. Telefonkodo:** 64**. Ĉefurbo:** Velingtono (Wellington). Kat.: 5.

**Areo:** 268 mil km². **Loĝantaro**: 4.8 milionoj (126a); 1.47 miliono en Aŭklando
**Denseco**: 18 homoj / km². **Jara Kresko:** 0.82%. **Meza Aĝo:** 38-jara. **Urbiĝo:** 87%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 44,226 do en la 42a loko en la mondo.
**Vikipedio:** Eo-paĝo ekzistas ampleksas, sed kelkaj datumoj estas iom eksdataj.

**Landa Asocio:** NZEA, 1910 (aliĝo al UEA 1938). Membroj de UEA fine de 2021: AM 16 + IM 17, sume: 33. Prezidanto: Ivan Pivaĉ.
**LA-adreso:** PO Box 8140, Symonds St, 1150 Auckland, Nov-Zelando
**Telefono:** 0800 350 781
**LA retadreso:** exec@esperanto.org.nz
**LA retpaĝo:** http://www.esperanto.org.nz (bela sed enirpaĝe nur anglalingve).
**Organo:** Esperanto sub la Suda Kruco (komuna organo kune kun Aŭstralio). 4 numeroj jare. Arĥivo alirebla tra la hejmpaĝo de AEA. Redakcio: esk@esperanto.org.au

**Membraro (IM) en UEA.** 2021: 17. 2009: 23. FC 2021: 0. 2009: 0
**Ĉefdelegito:**. Dave Dewar, Christchurch <esperantonewzealand<ĉe>gmail.com>
**Kotizperanto:**. NZEA.
**Komitatano A de UEA:** Observanto: David Ryan (ne notita ĉe UEA).

**Delegitoj en JL 2018:** 7 personoj (4 D, 3 FD) en 6 urboj.
**Aliaj asocioj:** ILEI (sekciestro Penny Vos por la Oceania sekcio: vidu ĉe Aŭstralio).
**Lokaj grupoj:** Aŭklando, Velingtono, Christchurch (kunvenas nur festokaze) Funkcias junulara grupo en la Universitato de Aŭklando. Kontakto kun la Societo en Aŭklando kaj la Universitata grupo: esperanto@aes.org.nz

**Internaciaj aranĝoj:** La kombinita kongreso en Aŭklando, januaro 2020, kune kun AMO 62 (vidu la foton). Plus pluraj pacifikaj kaj komunaj kongresoj kun Aŭstralio, plus kongresoj trilandaj kune kun Indonezio.




Foto: Kam Lee.

2022: iris apr 9. Senresponde.
2021: Sendita jan 9, respondis BM jan 29.

# Kanado

**Landkodo:** CA**. Mono:** CAD (dolaro)**. Telefonkodo:** 1**. Ĉefurbo:** Otavo (Ottawa). Kat.: 5.

**Areo:** 9.98 m. $km^2$ (2a en la mondo). **Loĝantaro**: 37 milionoj; 5,9 milionoj en Toronto.
**Denseco**: 3,7 homoj / $km^2$. **Jara kresko:** 0.89%. **Meza Aĝo**: 41-jara. **Urbiĝo:** 64%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 51,713 do en la 32a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas. Mencias la Eo-movadon.

**Landa Asocio:** KEA, 1958 (aliĝo al UEA 1960). Membroj de UEA fine de 2021: AM 20 + IM 77, sume: 171:  Prezidanto: D-ro Paul Hopkins.
**LA-adreso:** 110 Grand Ave. 414, London ON, N6C 1L8
**LA retadreso:** informo<ĉe>esperanto.ca
**LA retpaĝo:** https://esperanto.ca (3-lingva)

**Organo:** Lumo, 2 numeroj jare.

**Membraro (IM) en UEA.** 2021: 77. 2009: 69.  FC 2021: 0. 2009: 0
**Ĉefdelegito:**. S-ro Normand Fleury; Granby, <normandfleury<ĉe>gmail.com>
**Kotizperanto:**. KEA.
**Komitatanoj de UEA:** Guy Matte (Kom A por KEA), Dr. Mark Fettes, (Kom. C)
**Sidejo:** Ne estas.




**Delegitoj en JL 2018:** 13 personoj (8 D,1 VD) en 9 urboj.
**Fakaj Asocioj Aliĝintaj:** ***Instruistoj***: ILEI (sekcio kun Usono: W. B. Harris <ab_harris<ĉe> hotmail.com>.). ***TEJO*** havas paĝon en la retejo de KEA, sed ĝi estas malplena. Neniu plia konata.
**Lokaj grupoj:** Edmontono, Halifakso, Hamiltono**,** Kebeko, Kalgario, Kiĉenero, Londono, Montrealo, Otavo, Regina, Sagenio, Toronto, Vankuvero, Viktorio, Vindzoro. Tiu listo laŭ la retejo de KEA. Multaj havas retejojn. Aktivas aparte la kebekia societo, kun propra retrevuo 'Riverego' (vidu la bildon) kies malnovaj presitaj numeroj ankoraŭ riceveblas.
**Internaciaj aranĝoj:** La 69a UK en Vankuvero en 1984, la 105a UK en Montrealo planita por 2020 – okazis virtuale (vidu la bildon). La 48a IJK en Montrealo en 1992. La 53a Kongreso de ILEI planita por Kebekio en 2020. Tiu kaj la UK okazigotaj fizike kiam eblos. Pluraj Nordamerikaj Kongresoj okazis en Kanado, Usono kaj Meksikio. TAKE 7 (TutAmerika Kongreso de Esperanto) okazis en Montrealo, en julio 2008. AMO 2 okazis en Sidneo, Brita Kolombio, en julio 2014. Kongresoj planataj por julio-aŭgusto 2022.

2022:  iris apr. 9
2021 respondis la sekretario de KEA, kun korektoj.

# Meksiko 

**Landkodo:** MX**, Mono:** MXN (peso). **Telefonkodo:** 52**. Ĉefurbo:** Meksikurbo. Kat. 3.

**Areo:** 1.9 m. $km^2$ (14a en la mondo). **Loĝantaro:** 126 m, (10a) el kiuj 9 m ĉefurbe, 21 milionoj en la ĉefurba regiono.
**Denseco:** 66 / $km^2$. **Jara kresko:** 1.06% **Meza aĝo:** 29-jara **Urbiĝo:** 84%

**Pokapa MEP (PAP):** $ 20,266 (91a en la mondo).
**Vikipedio:** Havas paĝon en la E-vikipedio, sed la MEP kaj popolaj datumoj datas el 2006.

**Landa Asocio:** MEF. (1903. Aliĝo al UEA: 1978). **Prez.:** Mallely Martinez Mateos (adreso sube). **Membroj de UEA fine de 2021:** AM 101 + IM 33, sume 134. (bela kresko)
**LA-adreso:** Morayma Martinez M. , Av.523, No.187,1ª Sección de San, Juan de Aragón, Del. G.A. Madero, MX-07969 Ciudad de México.
**LA retadreso:** information@esperanto-mexico.org kaj estraro<ĉe>esperanto-mexico.org
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto-mexico.org, du-lingva.
**Telefono:** (596) 924 5144. **Membrogrupo:** *Estas.*
**Organo iama:** Ni ĉiu, red. p/a MEF. Finiĝis en 2018.

**Membraro en UEA (IM).** 2021: 33. 2010: 36. FC: 2021: 18. 2010: 2.
**Komitato de UEA:** La prezidantino (A).
**Kotizperanto:** Martinez Mateos (MEF)
**Sidejo:** Ĉe M.M.M. Mateos. Ne estas oficejo.
**Lokaj grupoj**: Guadalajara (Jalisco), Monterrey (Nuevo León), Oaxaca (Oaxaca), Puebla (Puebla), Querétaro (Querétaro), Tecámac (Estado de México – 40 km de la ĉefurbo). Vidu la mapon.




**Delegitoj laŭ JL 2018:** 2 en 2 urboj: Cetumai, Meksikurbo (México).
**Aliaj asocioj:**
TEJO (MEJ), https://www.facebook.com/MeksikaEoJunularo/
ILEI (sekcio): Carlos H. Loarca, <ilei<ĉe>esperanto-mexico.org>
Aliaj nekonataj.
**Internaciaj aranĝoj:** La Internacia Junulara Kongreso en Oaxtepec, Moelos, en 1981. La Nord-Amerika Kongreso en 1990 en Meksikurbo. La 5a TAKE (Tutamerika Kongreso) en 2001 Meksikurbo.

2022: iris apr 9
2021: Sendis feb 17. Respondis MEF.
2019: Iris al MEF, AMEKOM, MS dec 20; 2017: Referencis kontrau presita JL2017

# Usono 

**Landkodo:** US**. Mono:** USD (dolaro)**. Telefonkodo:** 1**. Ĉefurbo:** Vaŝingtono (Washington)

**Areo:** 9,8 m. km² (4a en la mondo). **Loĝantaro**: 332 milionoj (3a); 8 m. en Nov-Jorko.
**Denseco**: 36 homoj / km² (31a en la mondo). **Mezaĝo:** 38-jara. **Urbiĝo:** 82%
**Pokapa MEP:** $ 68,309do en la 15a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ege ampleksas, sed ŝajnas laste signife redaktita en 2011.

**Landa Asocio:** Esperanto-USA, 1952 (aliĝo al UEA 1955). Membroj de UEA fine de 2021: AM 350 + IM 273, sume: 623. 2019: 670 sed kresko de IM. Prezidanto: Philip Dorcas.
**LA-adreso:** 91-J Auburn St #1248, ME 04103 Portland, Usono
**LA retadreso:** <eusa<ĉe>esperanto-usa.org>
**LA retpaĝo:** http://www.esperanto-usa.org
**Libroservo:** http://esperanto-usa.org/retbutiko/
**Telefono kaj Fakso:** (510) 653-0998; fakso (510) 653-1468
**Organo:** Esperanto USA, 6 numeroj jare. Arĥivo alirebla

**Membraro (IM) en UEA.** 2021: 273. 2009: 270. FC 2021: 2, 2009: 0.
**Ĉefdelegito:** Philip Dorcas, Fort Worth; filipo<ĉe>grupoj.org>
**Kotizperanto:**. Esperanto-USA.
**Komitatanoj de UEA:** D-ro Orlando E Raola (A por Esperanto-USA), Pr-o Hans Becklin (A por TEJO), D-ro Duncan Charters (C)
**Sidejo:** Adreso en Portland, Maine.

**Delegitoj en JL 2018:** 56 personoj (45 D, 3 VD, 39 FD) en 49 urboj.
**Aliaj asocioj:**
***Blinduloj:*** LIBE, delegito en Florido.
***Instruistoj:*** ILEI (kuna sekcio por Usono kaj Kanado), Vilĉjo Harris, Portland, Maine, <wb_harris<ĉe>hotmail.com>.
***Junularo:*** TEJO (kun neregula rubriko KTP en 'Esperanto-USA'), Charlotte Burton, liquidfireangel@gmail.com,
***Komercistoj:*** IKEF-nordameriko: Kate Porter, Kanado: katelhporter@gmail.com
***Medicinistoj:*** UMEA, havas membrojn en Usono.


**Lokaj grupoj:** La retejo de la Landa Asocio donas aliron al la lokaj grupoj, laŭ la sekvaj regionoj: Central, Grandaj Lagoj, Centra Atlantiko, Meza nordo, Nordoriento, Nordokcidento, Sudo, Sudoriento kaj Kariba Maro, Sudokcidento, Okcidento kaj Pacifika Maro. Ĝi donas enirpordojn al multegaj lokaj grupoj (vidu la bildon).




**Internaciaj aranĝoj:** La 6a UK en Vaŝingtono en 1910, la 11a UK en Sanfrancisko en 1915, la 57a UK en Portlando, Oregon en 1972. Pluraj Nordamerikaj kongresoj, kune kun Kanado kaj Meksikio. AMO 12 en 2015,

AMO 25 en 2016, AMO 37 en 2017, AMO 48 en 2018, AMO 57 en 2019, Ĉiuj en Raleigh, NC en la Nordamerika Somera Kursaro – NASK, junie aŭ julie.

Kursaro: Pliaj informoj pri NASK: thttp://nask.esperanto-usa.org kaj https://www.esperantic.org/en/nask-2020-1-2/ Por informoj pri la kursaro por 2022, rigardu la retejon aŭskribu al: chuck.mays@esperantic.org




Kunlabore kun





2022: iris apr. 9. Ne veis respondo.
2021: Sendita jan 10, 2021, Respondis DF feb 22 pri NASK kaj TEJO.

============ooooooooooo============

## Landa Parad': Fontoj por 2021

### Popolaj datumoj

https://www.worldometers.info/world-population/population-by-country/
Prilaboro de datumoj de Uniĝintaj Nacioj, (Department of Economic and Social Affairs, Population Division. World Population Prospects: The 2019 Revision. Pli freŝa ne je dispono.

Ĉefurbaj popoloj, laŭ unuopaj esploroj. Kiam eble, temas nur pri la vera ĉefurba zono, foje temas pri la pli granda metropola areo.

### Publika bonfarto

https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_(PPP)_per_capita. Persona aĉetpovo MEP (PAP). Datumoj por 2021 aprilo laŭ ciferoj de la Internacia Monuma Fonduso (IMF) en USD.

SMG apr 8, 2022. Sed iris apr 6.
SMG mar 27, 2021